



La tri eksigitaj urbestroj dum gazetara konferenco hieraŭ en Istanbul.

CENTOJ DA ARESTITOJ EN KURDIO, DENUNCIS LA PDP⁽¹⁾

En gazetara konferenco okazinta hieraŭ(*) en Istanbul, la maldekstra partio PDP denunciis, ke la turka polico arestis centojn da manifestaciantoj en 11-taga periodo. Kiel klarigis Saruhan Oluc, proparolanto de la PDP: “Malfacilas scii ekzakte, kiom da homoj oni arestis”. Fakte, “oni ĉiutage kaptas homojn multope”, kaj laŭ la informoj de la turka Asocio por la Homaj Rajtoj⁽²⁾ oni jam malliberigis pli ol mil personojn pro partopreno en manifestacioj por protesti kontraŭ la elficigo de tri urbestroj el Kurdio.

Pasintan 19-an de aŭgusto la turka registaro elpostenigis la urbestrojn de tri kurdaj urboj, akuzinte ilin havi rilaton kun la PLK⁽³⁾. Selcuk Mizrakli, Ahmet Turk kaj Bedia Ozgokçe Ertan estas la elficigitaj urbestroj de Amedo⁽⁴⁾, Merdino⁽⁵⁾ kaj Ŭano⁽⁶⁾. La tri estas membroj de la PDP, kaj ili atingis la urbestrecon en la balotado de la 31-a de marto atinginte inter 54 % kaj 63 % el la voĉoj. Eksiginte ilin, la registaro nomumis po funkciulon urbestro; do, ili disponis pri malpli ol kvin monatoj por disvolvi sian maldekstran kaj feminisman programon. Laŭ Turk oni “forprenis” ilian oportunan labori.

De 11 tagoj la kurdoj protestas kontraŭ la decido de la turka registaro. Tamen, laŭ sciigo de la informagentejo *France Presse*, la manifestacioj ne estas tre multhomaj: kuniĝas ĉirkaŭ ducent homoj. Fakte, kiel inter multaj, informis la ĵurnalo *El País*, la polica subpremo “estas tre severa”. Laŭ la manifestaciantoj, “ne eblas fari proteston demokrate.”

Dum la manifestacioj oni faris multajn arestojn. En la sama tago, en kiu oni eksigis la tri urbestrojn, oni kaptis 418 homojn. Malgraŭ ke dum lastaj tagoj estas malpli da arestitoj, ĉiutage estas almenaŭ unu”, laŭ membroj de la PDP. Kiel klarigis la partio, kelkajn el tiuj homoj “oni arestas kaj liberigas post malmultaj horoj”, sed multajn aliajn oni “prevente enkarcerigas”. Hieraŭ matene oni arestis tri membrojn de la PDP en la kurda urbo Pirsuso⁽⁷⁾. Aliflanke, en la municipoj de la eksigitaj urbestroj oni denunciis la maldungon de laboristoj; en Merdino, ekzemple, la informagentejo *Firat* informis pri 150 maldungoj.

Dum la manifestaciantoj protestas kontraŭ la registara decido, la PDP renkontiĝis antaŭhieraŭ kun delegitaro de la EU. La tri elficigitaj urbestroj kaj la vicprezidento de la maldekstra partio Nazmi Gur havis la ŝancon paroli kun kelkaj ambasadoroj de la EU plus tiuj de Svisio kaj Norvegio. Laŭ la membroj de la PDP, la renkonto daŭris du horojn. La reprezentantoj de la EU esprimis, ke ili “de proksime” sekvas la proceson kaj ke ili restos “atentaj”.

Ne temas pri la unua kazo

Ne estas la unua fojo, en kiu la turka registaro decidas anstataŭi urbestrojn de la PDP: depost kiam en 2016 fiaskis puĉo ĝi elpostenigis pli ol 30 membrojn de la maldekstra partio. Kiel klarigis la eksurbestro Turk, la PDP apelaciis antaŭ tribunalo kontraŭ la registara decido, sed ĝi ne rifuzas apelacii antaŭ la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj. Laŭ ĝi, la ĉefaj celoj de la registara decido estas obstakli la lukton de la kurdoj por la demokratio kaj bloki la strebojn por ŝanĝi Turkion.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.
- (2) Asocio por la Homaj Rajtoj (AHR)/Komeleya Marên Mirovan (KMM). Insan Haklari Dernegi (IHD) en la turka.
- (3) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (4) Amed.
- (5) Mêrdîn.
- (6) Wan.
- (7) Pirsûs.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Ane Hurtado Uranga.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 30-an de Aŭgusto 2019-a.

Tradukis: NXC. Septembro 2019-a. Provlegis: DS.

